



# *Esperanto en Danio*

24-a jarkolekto • n-ro 1 • februaro 2017



*Internacia*  
**TAGO** *de la*  
**GEPATRA**  
**LINGVO**

21-a de februaro 2017

*La internacia lingvo **Esperanto** respektas kaj subtenas lingvan kaj kulturecan diversecon tra la mondo.*

En oficialaj rilatoj  
kun UN kaj Unesco

Foto © Jani Bryson



## Esperanto en Danio

membroorgano de  
Dana Esperanto-Asocio

ISSN 0909-6124

### Adreso de la prezidanto:

Peter Wraae

Eremitageparken 17 st, C

2800 Lyngby

☎ 60 70 79 69 [peter@wraae.dk](mailto:peter@wraae.dk)

Ĝirokonto de DEA: 1551-805 7370

UEA-kodo: deaa-t

### Kromaj estraranoj:

Arne Casper Mortensen (kasisto)

Finn Østerbæk (vicprezidanto)

Jens S. Larsen (sekretario)

Bent Jensenius

Ileana Schrøder

### Redakcia adreso:

Jens S. Larsen

c/o Trillingsgård, Munkebjergvej 77

2770 Kastrup

☎ 52 64 44 72 [eed@esperanto.dk](mailto:eed@esperanto.dk)

### Presado:

DDFO

### Adresŝanĝoj al:

Finn Østerbæk ☎ 24 96 04 45

[finnoesterbaek@gmail.com](mailto:finnoesterbaek@gmail.com)

Represo de artikoloj el EeD estas  
permesata kun indiko de la fonto.

Limdato por la venonta numero:

**01.05.2017**

## Enhavo

Jarkunveno de DEA.....	3
Je kies nomo.....	7
Progamo de KEK.....	10
Memoroj de DEFA-membro.....	12

Lerni lude.....	15
Kongresetoj de infanoj kaj adoleskantoj.....	18
Buller en Italio.....	19
Printempa Semajno Internacia....	20

Japanaj korespondemuloj.....	21
Vieno skanas.....	21
Zamenhof-busto en Havano....	23

Pri daŭripova turismo en Seulo	24
--------------------------------	----

Ni lavis la barbon de Zamenhof	26
--------------------------------	----

LibroServo vendas.....	27
------------------------	----

## **Jarkunveno de DEA**

La jarkunveno de Dana Esperanto-Asocio okazos

sabate-dimanĉe

la 25-an kaj 26-an de marto 2017.

en

Danhostel

Ørnsborgvej 10

6000 Kolding

Danhostel Kolding (la migrulhejmo) estas atingebla per buslinio 2 rekte de la stacidomo. Ĝi situas alte, kun panorama vido super la kastelo Koldinghus kaj la kastela lago. Ørnsborgvej estas flanko strato de Gøhlmannsvej.

## Programo

### *Sabate la 25-an de marto*

12.00 Tagmanĝo

14.00 Ekskurso al Koldinghus. La kastelo datiĝas de la 13-a jarcento kaj estas loko por ekspozicioj kaj multaj aktivaĵoj. Tove Bak mallonge rakontos pri la loko. Eblas rigardi la ekspozicion “Ĉielaj ŝtonoj”, kiu estas la kolekto de orientaj jadaj juveloj de lia princa moŝto Henriko, edzo de la reĝino.

Poste ni kafrinkos en la kafejo. Enirpago kaj kafo estas inkluzivitaj en la kotizo.

18.00 Vespermanĝo.

19.30 Prelego de Roman Dobrzyński: Zamenhof en Varsovio.

21.00 Filmo de Roman Dobrzyński: Bona Espero – nia Tero.

### *Dimanĉe la 26-an de marto*

9.30 Ĝenerala Kunveno de Dana Esperanto-Asocio. Provizora tagordo laŭ la statuto. Skribaj proponoj al la Ĝenerala Kunveno estas akceptataj de la estraro ĝis la 12-a de marto. – Poste kunveno de la ILEI-sekcio.

12.00 Tagmanĝo.

## Pago

**NB:** Via aliĝo ekvalidos nur per antaŭpago de la tuta sumo po persono **antaŭ la 10-a de marto 2017**, al nia konto ĉe Danske Bank: reg. 1551, n-ro 805-7370. Pagante bonvolu samtempe indiki kion vi mendas, aŭ informu pri tio telefone aŭ rete al **Arne casper, Bryggervangen 70, 4.tv., 2100 Kbh Ø, telefono: 2140 8487, retadreso: [arnecasper@yahoo.com](mailto:arnecasper@yahoo.com)**.

## Prezoj

Por la tuta semajnfino ekde sabato ĉ. 12.00 ĝis dimanĉo ĉ. 13.30

Jarkunvena kotizo 100,00 kr

Plena pensiono en dupersona ĉambro je persono 1295,00 kr.

Plena pensiono en unupersona ĉambro je persono 1495,00 kr.

Ni renkontiĝos por tagmanĝo sabate kaj revojaĝos post tagmanĝo dimanĉe.

Ni povas aliri la ĉambrojn sabate je la 16.00 kaj devas forlasi ilin dimanĉe je la 10.00.

Plena pensiono sabate kaj dimanĉe sen tranokado 645,00 kr

Restado nur kun vespermanĝo sabate 390,00 kr

Estos vegetaraj pladoj en ĉiuj manĝoj.

## Speciala gasto

**Roman Dobrzyński** studis en Varsovia Universitato du fakultatojn: juron kaj ĵurnalismon. Li laboris 35 jarojn en la Pola Televido kiel ĵurnalisto kaj reĝisoro de dokumentaj filmoj. Lia kampo de la profesia okupo ĉefe estis la latinamerika mondo. Krom multaj ĉi-temaj filmoj li publikigis naŭ librojn pri Hispanio, Portugalio kaj kelkaj latinamerikaj landoj.

R.D. esperantistiĝis junaĝe en 1955, aktivis en la junulara movado, interalie kiel vicprezidanto de TEJO (1966-69). En 1987 li estis elektita prezidanto de Pola Esperanto-Asocio kaj en tiu rolo partoprenis la organizadon de la jubilea Universala Kongreso de Esperanto, la plej granda en la historio de la movado (6000 partoprenantoj). En 1989 li estis elektita vicprezidanto de UEA, kaj en 2005 nomita honora membro de ĝi.

Profitante sian pozicion de konata televida ĵurnalisto, li prezentis multfoje raportaĵojn, kiuj koncernis Esperanton. Kiel sia plej grava kontribuo al Esperanto li konsideras esperantigon de la televida kurso “Mazi en Gondolando, kaj publikigon de la libro “Zamenhof-strato”, kiu el Esperanto estis tradukita en 18 lingvojn kaj eldonita en 15.

Post sia emeritiĝo li dediĉis sin al Esperanto. Plurfoje vizitis la brazilan edukejon “Bona Espero”, faris pri ĝi plurajn filmojn kaj verkis libron “Bona Espero – idealo kaj realo”. Alia lia kampo de esplorado estis la japana religia organizaĵo Oomoto, kiu ekde la jaro 1923 okupiĝas pri Esperanto. Li skribis libron “Rakontoj pri Oomoto”, kiu estis eldonita kune kun la filmo “Japana Printempo”. Tiu ĉi filmo ricevis la unuan premion en la Belarta Konkurso de UEA kaj enmanigita al li dum la UK en Kopenhago (2011).


Dum sia vizito al Danlando (24-28/3, 2017) li intencas spektigi sian lastan filmon “Bona Espero – nia Tero”. La filmo montras, kiel Bona Espero ĉesas agi kiel edukejo por infanoj kaj transformiĝas en Kulturan Esperanto-Centron.

Li proponas prelegon okaze de la 100-a datreveno de la morto de Ludoviko Zamenhof kun titolo:

### **Zamenhof en Varsovio.**

Ĝus li finis verki tiun libron kaj deziras paroli pri ĝia enhavo. La kreinto de Esperanto fiksiĝis en ĝia historio kiel bjalistokano. La preleganto ne kontraŭstaras en sia nova libro tiun ĉi opinion, sed deziras gvidi leganton tra la lokoj en Varsovio, kie Zamenhof pasigis 44 jarojn de sia vivo, kie li lernis, studis, laboris kaj inventis Esperanton. Specialan atenton li volas direkti al la Juda Tombejo en Varsovio, kie eterne ripozas li mem kaj liaj proksimuloj. La aŭtoro volas paroli pri la milita sorto de la familio Zamenhof, iliajn travivaĵojn parte tute ne konata al la esperantistaro.

## Je kies nomo



La vicprezidanto de UEA Stefan McGill rekomendis la landajn asociojn laŭtlegi la poemon “Je kies nomo” de Tibor Sekelj (surfote) okaze de la Tago de la Libro, kaj en la kopenhaga Zamenhofa festo en decembro 2016 ĝi estis prezentita de Ileana Schröder. Jen la sentema poemo. Ĉu vi povas diveni pri la 4 religioj kiujn li mencias en sia poemo?

Reĝido sub arbo sidis  
Longajn jarojn.  
Subite li klare vidis  
Darmon kaj karmon.  
« Faru bonon. Regu modero.  
Via reenkarniĝo pli fora, pli glora. »  
Li deklaris je l’ nomo del vero,  
la sola vero sur tero.

Tra liaj vortoj la homoj sentis  
La veron. Ili obeis.  
Ili ne plu oferis. Sin ne turmentis,  
feliĉaj ili vivis  
je l’ nomo de l’ vero...  
ne plu en mallumo drivis.

Barbulo grimpis monton  
Dek literojn li ĉizis en ŝtonon.  
Revene li proklamis je nomo dia :  
« Ĉesu murdado plia,  
ŝtelado ĉesu, ne plu kokru,  
aliajn diojn ne adoru ! »

La homoj akceptis la diajn admonojn :  
detruis idolojn, ne plu murdis homojn,  
fidelis al siaj edzinoj senvorte,  
ĝismorte.

El trogo leviĝis senhelpa infano  
kun mano malforta, buŝo malmultvorta,  
en la mondon li ekiris.  
« Amu kiel vin mem, vian najbaron »,  
je l' nomo de sia patro, dio, li diris  
kaj « post vangofrapo montru la alian vangon.»

La homoj lin kredis, en amo lin sekvis  
kaj montris la vangon eĉ sen antaŭa frapo.

Kamelgardisto vagadis tra dezertoj  
Meditis longe, kolektis spertojn  
Kaj eldiris leĝojn je dia nomo,  
Kiujn devas ĉiu homo obei :  
« morton al ĉiuj kiuj kuraĝas nei ! »



Kaj ekmoviĝis sankta milito  
kun arda fervoro kaj obstina spito  
por venki aŭ pere! !

Ankaŭ mi grimpis monton kaj sub arbo sidis  
kuŝis en trogo, perditajn gvidis,  
meditis en dezerto pri akiritaj spertoj.

Kien ajn mi iras, mi diras :  
« vivu en paco, ne plu militu.  
Panon disdonu, ne plu ĵetu bombojn,  
Bomboj kreas mizeron, dum dolĉas la pano !  
Homoj... estu homoj ! »

Mi krias kaj petas, ĝisraŭke ripetas,  
Senrezulte : ili plue bombojn ĵetas  
Urbojn detruas, animojn skuas.  
Por peco da pano skeletoj vicostaras  
Kaj kie ĝi abundas, pano amaras.  
...Ĉar finfine... je kies nomo mi krias  
naivulo romantika ?

Eĉ mi mem ne scias !

28.12.1987

*(El "Kolektanto de ĉielarkoj")*

## Progamo de KEK

Konversacia Esperanto-Klubo kunvenas **ĉiulunde je la 19-a horo** en la “Kulturdomo” Tomsgårdsvej 35, 2430 Kopenhago NV. Bonvolu eniri la kulturdomon malantaŭe per la pordo ĉe la aŭto-parkejo.

Prepare al la 100-jara datreveno de la morto de Zamenhof ĉi-jare, ni havos monatan Zamenhofan Vesperon. Ni legos paroladojn kaj leterojn de Zamenhof kaj pridiskutos ilin. Ili estas troveblaj rete ĉe

<http://tekstaro.com/prenitutantekston.pl?nomo=paroladoj-de-zamenhof>

“Paŝoj al plena posedo” troveblas ĉe

<http://www.elferno.cn/elibro/pasoj%20al%20plena%20posedo>

La 6-an de februaro: Lumbild-prelego pri Euskio (Baskerlandet).

Jan kaj Lene Niemann prelegos kaj montros bildojn el pluraj vizitoj en tiu interesa kaj tumulta regiono en norda Hispanio kaj suda Francio.

La 13- de februaro: Zamenhofa Vespero.

Ni legos la paroladon de 1906 en Ĝenevo.

La 20-an de februaro: Studgrupo.

Paŝoj al plena posedo de William Auld. Paŝo 5.

La 27-an de februaro: **Ĝenerala Kunveno**

Vidu la provizoran tagordon ĉe <http://esperanto.dk/kalendaro>.

Proponoj al la Ĝenerala Kunveno devas esti enmanigitaj al la estraro antaŭ la 14-a de februaro.

La 6-an de marto: Filippo montras italan kurtfilmon (30 minutoj) kaj klarigas pri ĝi. Poste ni spektas la filmon denove kaj komentas lian tradukon Esperantan. La filmo nomiĝas “Kio estas la nuboj”, kaj estas verko de la poeto Pier Paolo Pasolini (Pjer Paŭlo Pazolini); ĝi ne estas amuza kiel la antaŭa, sed tre bela kaj kortuŝa.

La 13-an de marto : Zamenhofa Vespero.

Ni legos la paroladon de 1912 en Krakovo.

La 20-an de marto: Studgrupo.

Paŝoj al plena posedo de William Auld. Paŝo 6.

La 27-an de marto: Jen mia (esperanta) vivo

Sven Ziegler respondos viajn demandojn pri sia (Esperanta) vivo kaj sia laboro, ktp.

Sven Ziegler estis prezidanto de Apelacia Kortumo (Østre Landsret) dum 11 jaroj. Li ankaŭ estis estrarano de Studenta Esperanto-Klubo, de la dana asocio CDEL, de la LKK de la Universala Kongreso en 1962 kaj, fine, de la estraro de UEA 1962-64.

La 3-an de aprilo: Zamenhofa Vespero.

Ni legos la leteron “Alvoko al la diplomatoj” kaj lian lastan manuskripton:

La 10-an de aprilo kaj la 17-an de aprilo ne okazos kunvenoj pro la Pasko.

Por la **mortotago de Zamenhof** la 17-an de aprilo oni planas biciklan rondiron al la tomboj de historiaj kopenhaganoj gravaj por la ideo de internacia lingvo kaj por Esperanto. Informoj sekvos.

La 24-an de aprilo: Babila vespero

Venu babili pri ĉio aŭ nenio

La 1-an de majo: Renkontiĝo en Fælledparken dumtage (*ne* en la kluba kunvenejo).

La 8-an de majo: Studgrupo.

Paŝoj al plena posedo de William Auld. Paŝo 7.

## Memoroj de DEFA-membro

Ofte oni diras, ke niaj memoroj estas ‘facile manipuleblaj’. Post nur malmultaj jaroj la infanaĝo, la junaj jaroj, la soldatserva tempo fariĝas la bona, malnova tempo. Mi devas konfesi, ke por mi mem validas tiu teorio ... kaj jen kelkaj memoroj de la unuaj jaroj de mia ‘Esperanta vivo’.

Kiam mi eklernis Esperanton en 1981, estis vigla kluba vivo en DEFA. Ekzistis kluboj en Århus, Odense, Næstved kaj Kopenhago, kaj en Kopenhago, kie mi ‘hejmis’, ni kunvenis unufoje semajne. Tie mi lernis Esperanton – la pli lertaj kaj spertaj instruis al la novuloj, kaj mi sukcesis trapasi la unuagradan ekzamenon post unu vintro (tute alia sistemo ol nun). Post tio mi neniam plu pensis pri ekzameno. Mi povas uzi, mi povas komprenigi min, mi sentas, ke mi daŭre lernas – tio sufiĉas por mi.

En la klubo, kiu hejmis en malnova ligna barako apud la trajnriparejo en Kopenhago, ĉiuj helpis pri la praktikaj aferoj. En la klubo estis vigla vivo. Estis tri salonoj en diversaj grandecoj, kaj krome kuirejo kaj necesejoj. La ejo situis apud la centra DSB-metiejo, kaj ni senkoste ‘loĝis’ tie, same kiel la fervojlibertempaj ŝakludantoj. Ankaŭ en multaj aliaj lokoj kaj urboj DSB tiamaniere helpis al la fervojlibertempa asocio per ejoj.

Ni povis havi 4-5 kurs- kaj studgrupojn samtempe – en la du pli grandaj salonoj povis sidi malgranda grupo en ĉiu fino kaj labori. Studgrupoj okazis posttagmeze, kaj vespere estis kurso paralele kun programo – prelegoj de la plej diversaj specoj kaj aliaj aranĝoj.

Ni komencis la sezonon en septembro, kaj ĉiam estis la ambicio de komencantoj partopreni por la unua fojo la kunvenon meze de novembro, kiam okazis la tradicia NUMERLUDO. Ankaŭ kiam mi lernis, ni strebis lerni la ciferojn (almenaŭ ĝis 90), por ke ni povu sekvi la ludon. Tiu numerludo estis verŝajne por multaj aliaj ol mi la unua pruvo, ke Esperanton oni lernas relative rapide – kaj ĝi funkcias!

Ĉiulunde post laboro ni iris al ‘La olda pavilono’ – klubanoj venis de Næstved, Hillerød, Helsingør (kiel mi) kaj ne hezitis iri tiun longan vojon

por esti kun kolegoj kaj amikoj por flegi komunan intereson.

Fikspunktoj en la kalendaro estis

- Sezon-starto; en septembro estis granda festo kun partopreno de ĈIUJ (preskaŭ) klubanoj, instruantoj, gvidantoj, lernantoj kaj amikoj de la klubo
- Bona Espero-vespero; Astrid Birckbak kaj Erik Mortensen havis bonajn rilatojn al la lernejo en Brazilo, eĉ vizitis la lokon, kaj ili iniciatis tradicion, ke ni unufoje jare kolektis monon por pagi la afrankkostojn por sendi pakaĵojn kun vestaĵoj, lernmaterialoj, ludiloj k.s. al Bona Espero. La kolektado okazis per aŭkcio. Ĉiam tre amuza (kaj samtempe utila kaj valora) vespero
- Kongresvespero(j); en majo multaj klubanoj partoprenis la kongreson de IFEF, kaj iam aŭtune ni faris kongresvesperon. Memoroj, fotoj, raportoj ... kelkfoje unu vespero ne sufiĉis.



- Julemiko; nekredeble kion oni povis aranĝi sub la lerta gvido de Karen, generalo pri trinkaĵoj kaj manĝaĵoj, Ĉio, kio apartenas al dana tradicia 'kristnaska lunĉo' (kiun oni povas manĝi ankaŭ vespere) estis surloke. Pri distro kaj entute planado kaj gvido de la Julemikoj zorgis Henning Olsen.

Mi devas konfesi, ke mi kune kun Jan 'ŝtelis' la Julemikon, ĉar nun ni okazigas ĉiujare en decembro jam tradician kaj tre ujutnan kuneston por

amikoj. Tamen, la manĝaĵon oni ne povas kompari kun tiu de Karen ...

La prelegoj estis ofte de eksterlandanoj, kiuj per Prelegvojaĝa Servo travojaĝis la landon kaj vizitis diversajn klubojn (de DEFA, DEA kaj DLEA), tiel ke la elspezoj estis elteneblaj por la unuopaj kluboj.

Estis bonaj jaroj. Ni ĝuegis kaj lernis multon. Amikecoj por la vivo ekestis kaj firmiĝis en tiuj jaroj.

La grundo de mia Esperantaj vivo kaj aktiveco estas en tiu malnova ligna barako ĉe la trajnriparejoj. Tre bonajn memorojn mi havas de tie. Mi certas, ke per edukado.net, lernu.net aŭ duolingo oni neniam havus samajn travivaĵojn kun aliaj homoj kaj neniam samajn memorojn, sed verŝajne estas mi, kiu maljuniĝas ...

Krom la klubkunvenoj kaj la aliaj aranĝoj en Danio estis ankaŭ Nordiaj Esperanto-Kunvenoj kun partopreno de Norvegio, Svedio, Finnlando kaj Danio. Tiu kunlaboro bedaŭrinde ne plu ekzistas. Ni havis multajn belajn tagojn kune – en Rapham, Mariehamn, Ry ...

Krom tio kompreneble ludis gravan rolon la ĉiujara kongreso de IFEF (Internacia Fervojista Esperanto-Federacio) – Danio ĝin organizis kelkfoje, plej laste en 1998. Jen foto de Henning Hauge, kiu ricevas la flagon fine de la kongreso en Francio 1997.



(La fotojn faris Karen K. Olsen.)

*Lene Nieman [Dana Fervojisto 2 / 2016]*

# Lerni lude

Dum interesa grupvespero, renkontiĝo aŭ leciono, la organizanto aŭ la partoprenantoj devas oferti aŭ proponi societajn ludojn. La ludoj ne estu komputilaj ludoj, sed eble laŭtradiciaj ludoj, eble de la infaneco. Por komputilaj ludoj la partoprenantoj ja havas la ŝancon en siaj hejmoj. La ludoj devas havi rilaton al lingvoj, speciale al Esperanto.

Laŭ miaj observoj la kutimaj ludoj estas pli bonvenaj ol ludoj sur la ekrano. Estus avantaĝe, ke la kunludantoj havas la sciojn de ludo laŭ sia gepatra lingvo, sed tio ne estas kondiĉo. La gvidanto ĉiam devas helpi dum la paso de la ludo.

Mi proponas ĉi tie kelkajn ekzemplojn, kiujn mi ludis kun miaj amikoj kaj samkursanoj.

## 1 – Skrablo

Skrablo estas angla ludo (Scrabble). Oni ludas tiun ludon en la tuta mondo. Du ĝis kvar kunludantoj okupiĝas laŭ la maniero de krucvortenigmo.


Ĉiu ludanto ricevas nombron da “tegoletoj”, malgrandaj lignaj platoj kun litero. Por la tegoletoj oni havas starigilon. Ĉiu litero havas alian valoron kaj oni povas fari vortojn per la tegoletoj laŭ la reguloj de la ludo.

Tiu ludo ne nur estas ludo, sed ankaŭ instruilo kaj lernilo. Uzante ĝin dum instruado kaj pliklerigado oni povas atingi plurajn celojn:

profesiaj	emociaj	metodaj
pliigo de la vortostoko	konfliktsolvado	trejnado de la vortaro
vortoformato (radikvorto, silaboj, kunmetaĵoj)	ĝojo pri la lingvo	
	koncentriĝo	
ortografia praktikado	gajnado kaj perdado	
gramatika praktikado	akcepto de partneroj	

Ankaŭ eblas ludi skrablon per interreto kontraŭ aliaj Esperantistoj:

<http://skrablo.ikso.net/>.



## Gravaj konsiloj

Detalaj ludreguloj troveblas en la jena retpaĝo:

<http://skrablo.ikso.net/regularo.php>

La jena paĝo informas pri la temo “*Skrablo*: vortludo populara, tamen iom ĥaosa”:

<http://bulteno.esperanto-usa.org/2014/2/40-ludoj-skrablo.html>

Ankaŭ Vikipedio informas pri la ludo en Esperanto:

<https://eo.wikipedia.org/wiki/Skrablo>

*Mia edzino alifunkciigis la germanan ludon en Esperantan version. La distribuadon de la literoj kaj la poentojn ŝi prenis de la jena retpaĝo: <http://skrablo.ikso.net/regularo.php>*

## 2 – Vortludo “fino = komenco”

La unua persono skribas substantivon ellasante la o, ekzemple dom’. La dua persono skribas vorton komencante per la fina litero de la radiko de la unua vorto “m”, ekzemple motor’.

La sekvanta sinsekvo povus esti: motor’ – ran’ – nokt’ – tem’ – ktp.

Tiu ludo ne postulas grandan elspezon. Mi rekomendas, ke vi ĉiam ludu mallongan tempon dum ĉiu leciono.

La ludontoj devas interkonsenti, ĉu oni rajtas uzi vortaron. Por la skribado kaj eventuale por la serĉado en vortaro oni devas interkonsenti pri la maksimuma tempo de ĉiu kunludanto.

Oni povus skribi sur tabulo de la lernejo aŭ sur papero. Ĉi tie mi proponas facilan ŝablonon:



nomo	vorto	vorto	vorto	vorto	vorto	vorto
Monika	dom <sup>o</sup>					
Klaus		motor <sup>o</sup>				
Oirik			ran <sup>o</sup>			
Dirk				nokt <sup>o</sup>		
Pedro					tem <sup>o</sup>	

Faru kopiŝablonon por la kolektiva laboro per papero laŭ la sekvanta propono:

Nomo: ..... Dato: .....

**Tasko:**

*La unua persono skribas substantivon kaj uzas anstataŭ "o" = ' (apostrofon) ekzemple "dom"* kaj la dua persono skribas vorton komencante per la fina litero de la radiko de la unua vorto "m" = "motor".

Alia ebleco por tiu ludmaniero estas, ke ĉiu partoprenanto ricevas laborfolion kun la jenaj indikoj:

Unua vorto = .....

*Skribu la sekvantajn vortojn komencante per la fina litero de la radiko de la unua vorto.*

1.	2.	3.	4.	5.	6.
7.	8.	9.	10.	11.	12.
13.	14.	15.	16.	17.	ktp.

Post antaŭe interkonsentita tempo, ekzemple 5 minutoj, la ludanto kalkulas la vortojn kaj provas la ĝustecon. Venkinto estas la persono kun la plej multaj ĝustaj vortoj.

Se vi volos ludi tiun ludon sola, en la interteta paĝo [lernu.net](http://lernu.net) vi trovos taŭgan eblecon en la forumo/lingvaj ludoj/VortLudo.

*Klaus Santozki*

## Kongresetoj de infanoj kaj adoleskantoj

Gepatroj kiuj partoprenos UK en Seulo, povas veni kun siaj GEFILOJ.

La *Internacia Infankongreseto* (IIK) okazos rande de Seulo, en nacia parko, en la junulara gastejo Bongdo, ĉ. 10 km de la UK-ejo, kie regule veturas publikaj busoj. Oni atendas 45 infanojn kaj adoleskantojn de ĉiu aĝo; jam aliĝis 37 inter 7- kaj 17-jaraĝaj el 3 kontinentoj.



Songanta (SHIN Eunsook), kiu kun la helpo de seppersona teamo pretigis grandan interesan programon en taŭga kongresejo, prezentas sin:

Mi profesias kiel faka instruisto pri Esperanto en alternativa mezlernejo «FELIĈA». Ĉiujare mi kun la lernejoj adoleskantoj faras Esperanto-vojaĝon tra la mondo por praktiki Esperanton kaj Esperantujon. En Nitro, mi havis ŝancon jam sperti IIK-on kiel gvidanto. Kun bonveniga koro kaj sperta talento, nia teamo varme akceptos viajn infanojn en Seula IIK. Bonvenon al tutmondaj infanoj!

Retejo: <http://bertosch.free.fr/iik2017>.

Retadreso: [infana.kongreseto@gmail.com](mailto:infana.kongreseto@gmail.com)



De la 5-a ĝis la 13-a de aŭgusto en Francio okazos *Festa Semajno por Infanoj kaj Familioj*, kun kursoj kaj aktivaĵoj por ĉiuj.

Konsultu la agendon de la franca Esperanto-kastelo.

Retejo: <http://gresillon.org/?lang=eo>

Retadreso: [kastelo@gresillon.org](mailto:kastelo@gresillon.org)

## **Buller en Italio**

Osmo BULLER, la nove demisiinta legenda ĝenerala direktoro de UEA dum la pasintaj pluraj jardekoj, gvidos seminarion en la Itala Esperanto-Kongreso, kiu okazos fine de aŭgusto en suda Italujo (Heraclea, Policoro, 2017-aŭg-26 ĝis 2017-sep-02). Lia seminario rilatos al la kongresa temo: Kulturo kaj komunikado en Eŭropo, en kiu li aparte parolos pri la komunikado de esperantistoj per reta kaj papera gazetaro.

Sed, ĉar li estas Osmo Buller, li povos respondi iun ajn demandon kaj trakti iun ajn temon, kiun la partoprenantoj volos levi ekde “Kiu ŝtelis la ĉokoladon de la volontuloj de TEJO dum la kafpaŭzoj?” ĝis “Ĉu la nuna UEA marŝos al glora estonteco, solvinte kelkajn neproblemojn kiel tiun de la membronombro aŭ de la neaperanta revuo?”

Ne maltrafu ĉi tiun unikan okazon kleriĝi pri la Esperanto-movado estinta, estanta kaj estonta. Iru al la ret-paĝo [kongreso.esperanto.it](http://kongreso.esperanto.it) kaj aliĝu tuj.

*[Informitale 211]*

# Printempa Semajno Internacia

**10-a de aprilo 2017 ĝis 17-a de aprilo 2017 en Essen, Germanio**

La Printempa Semajno Internacia estas granda internacia renkontiĝo por la tuta familio. Ĝi okazas ĉiujare dum unu semajno ĉirkaŭ pasko ie en Germanio. Por la 33-a PSI ni atendas pli ol 100 partoprenantojn el pli ol 10 landoj, el kiuj minimume kvarono estos infanoj aŭ junuloj.

PSI estas precipe familia seminario. La programo celas kontentigi samrajte plenkreskulojn, junulojn kaj infanojn. Sed tio ne ekskluzivas unuopulojn, ĉiu estas bonvena.

La PSI-ejo estas migrulhejmo kiu situas en la bela urboparto Essen-Kettwig. Ĝi estas moderna konstruaĵo kun komfortaj ĉambroj kaj helaj salonoj.

La taga programo ĉiutage ekas post la matenmanĝo kaj ofertas du sesiojn da diversaj prelegoj. Niaj partoprenantoj prezentas aferojn de la propra hobbio ĝis gravaj politikaj diskutoj. Ankaŭ estas kursoj: Unu por kompletaj komencantoj, alia kun lingvoekzercoj kaj plibonigoj, plie eble ankaŭ konversacia rondo.



Por partoprenantoj inter 14–20 jaroj estos aparta programo kun interalie “kaosludo”, turniroj kaj granda 3D-kinejo. Plenkreskuloj bonvenas. La infanoj komune lernos, manverketos kaj ludos interne kaj ekstere – kaj ĉar estas dum la pasko, kompreneble okazos granda paska ovoserĉado!

La partoprenkotizo estas inter 160 kaj 400 eŭroj depende de aĝo kaj komfortnivelo. Pliaj informoj kaj aliĝilo ĉe <https://psi.esperanto.de/2017/>

## Japanaj korespondemuloj

Koresponda servo de la Japana Esperanto-Instituto sendis jenas peton:

Koresponda Servo de JEI peras korespondadon inter japanaj kaj eksterlandaj korespond-dezirantoj. Ni petas vin anonci al viaj membroj pri nia servo jene: se vi interesiĝas pri korespondado kun japanoj, bonvolu turni vin al

Koresponda Servo de Japana Esperanto-Instituto

Sinzyuku-ku Waseda-mati 12-3

Tokio, Japanio

Skribante al ni korespondo-peton, bonvolu aldoni vian aĝon, sekson, profesion, interesojn kaj viajn preferojn por faciligi nian laboron.

Respondeculo de Koresponda servo de JEI

*Nobuo Sakuraj*

## Vieno skanas

Okaze de la Zamenhof-jaro la Internacia Esperantomuzeo kaj la Kolekto por Planlingvoj ĉe la Aŭstria Nacia Biblioteko prioritatas skanadon de la verkoj de Ludoviko Zamenhof. La celo estas ene de la jaro prezenti ĉiujn liajn verkojn aperintajn ĝis 1930. Jam pli ol 125 libroj nun estas libere kaj senpage legeblaj ĉe la retejo de la Kolekto por Planlingvoj, antaŭ nelonge modernigita por esti pli facile legebla per poŝkomputiloj, tabulkomputiloj kaj saĝtelefonoj:

<http://www.onb.ac.at/eo/bibliothek/sammlungen/kolekto-por-planlingvoj/>

La Esperantomuzeo havas apartan retejon:

<http://www.onb.ac.at/eo/museen/esperantomuzeo/>



La kolektoj inkluzivas librojn, periodaĵojn, dokumentojn pri la Universalaj Kongresoj de Esperanto kaj pri la unua mondmilito. Novaj dokumentoj estas konstante aldonataj kaj scienca blogo regule informas pri interesaj temoj rilate al Esperanto, planlingvoj kaj interlingvistiko.

Scienca blogo: <http://www.onb.ac.at/forschung/forschungsblog/>

Jam estas katalogitaj kaj ciferecigitaj granda parto de la revuoj, kiujn Dana Esperanto-Asocio donacis al la Esperantomuzeo en Vieno. Per la katalogo Trovanto oni povas tute libere kaj senpage legi ilin. Temas pri la jenaj:

Esperanto Bladet Helpa Lingvo (1907)

Dana Esperantisto (1908-1912)

Danlando (1912-1913)

Esperanto Raporto de Centra Dana Esperantista Ligo (1913-1919)

La Forta Voko (1926-1928)

Dansk Esperanto Blad (1929-1945)

Dansk Esperanto-Tidende (1942-43)

Liston de la jam ciferecigitaj periodaĵoj oni povas vidi ĉe

<http://www.onb.ac.at/sammlungen/plansprachen/19056.htm>.

*Laŭ informoj de Bernhard Tuidler*

## Zamenhof-busto en Havano

Kuba Esperanto-Asocio ekigis la Zamenhofan Tagon kaj Jaron per senvualigo de Zamenhof-busto ĉe la Nacia Sidejo de KEA, kun ĉeesto de eksterasociaj gastoj kaj ĵurnalistoj el diversaj amaskomunikiloj tutlandaj kaj lokaj.

Temas pri la unua busto de Zamenhof en Kubo omaĝe al la iniciatinto de Esperanto, aranĝo kiu malfermas la celebradojn okaze de la 100-a datreveno de la morto de Zamenhof nialande.

La ceremonion ĉeestis reprezentanto de la pola ambasadejo, Adrian Chrobot, ataŝeo pri aferoj politikaj kaj ekonomiaj (maldekstre en la suba foto kun la prezidanto de KEA), kaj de la direkcio pri internaciaj rilatoj de la ministerio de kulturo, de la asocio de lingvistoj de Kubo plus estraranoj kaj aktivuloj de KEA en Havano.



Oni ankaŭ inauguris ekspozicion pri fotoj kaj libroj en la halo de nia Havana Esperanto-Centro kaj sekve en la korto de la domo okazigis komunan toston je la sano de Esperanto, dum nia artistino Jany Quiñones gitarludis kaj kantis la faman kanton Kuban “Amu min multe”, kiu ravis niajn neesperantistajn gastojn, kiuj por la unua fojo aŭdis nian lingvon en bela kanzono.

Ĉi-vespere okazos Esperanta Zamenhofa Vespere kie oni faros komunan legadon de Esperanto-verko kaj ankaŭ profitos por fari postmortan omaĝon al du kubaj esperantistoj ĵus forpasintaj, Onoermis Acuña kaj Martin Castro.

*Maritza Gutierrez Glez*

## **Pri daŭripova turismo en Seulo**

Laŭ decido de la Estraro de UEA, la 102-a Universala Kongreso de Esperanto traktos la temon *Turismo kaj evoluo: vojoj al daŭripovo*. Tiun elekton inspiris la decido de Unuiĝintaj Nacioj (UN), nomi la jaron 2017 la Internacia Jaro de Daŭripova Turismo por Evoluigo.

*La nuntempa amasa turismo kreskis el ideoj kaj entreprenoj, kiuj formiĝis en la sama epoko kiel Esperanto, komentas Mark Fettes, la Prezidanto de UEA. Ĝi havas grandan potencialon interproksimigi homojn, sed ĝi povas ankaŭ esti medi- kaj kultur-detrua. En tempo, kiam la mondo serĉas daŭripovajn solvojn por siaj problemoj, la ligiteco inter tutmonda komunikado kaj tutmonda vojaĝado fariĝis grava demando.*

Laŭ la statistiko de UN, preskaŭ dekono de ĉiuj laborpostenoj tutmonde rilatas al turismo. La signifo de tiu ekonomia sektoro *estas ofte subtaksata*, laŭ la Ĝenerala Sekretario de la Monda Turisma Organizo, Taleb Rifai. Precipe en la ekonomie plej malfortaj landoj, la disvolvo de daŭripova turismo povus esti efika rimedo en la streboj por forigi akutan malriĉecon – la unua el la 17 Celoj por Daŭripova Evoluigo (CDE), kiuj nun gvidas la



laboron de UN. Ankaŭ ĉe aliaj el la CDE, ekzemple Celo 8, pri ekonomia evoluo, Celo 12, pri daŭripovaj konsumado kaj produktado, kaj Celo 14, pri protektado de la oceanoj, turismo starigas samtempe grandajn problemojn kaj grandajn ŝancojn.

En sia rezolucio proklamanta la Jaron, la Ĝenerala Asembleo de UN aparte substrekis la kulturan signifon de turismo *por nutri pli bonan interkompreniĝon inter la popoloj ĉie, por pligrandigi la konscion pri la riĉa heredaĵo de diversaj civilizacioj, kaj por disvolvi pli profundan aprezon de la propraj valoroj de diversaj kulturoj, tiel kontribuante al la plifortigo de paco en la mondo.* Tiuj ideoj, tiel proksimaj al tiuj de la esperantistoj, substrekas la valoron de pli vasta kleriĝado, diskutado kaj agado pri daŭripova turismo – ne nur en la 102-a UK mem, sed ankaŭ en pli longa perspektivo.

*Nia movado konsistas el homoj scivolemaj pri aliaj landoj kaj kulturoj, kiuj volas renkonti la lokanojn en rilatoj de egaleco, klarigas Fettes. Tio estas jam valorega kontribuo al la koncepto pri daŭripova turismo. Ni povus tamen fari multe pli por disvolvi la edukan kaj medikonscian flankojn de la turismo en Esperanto. Mi esperas, ke la kongreso en Seulo helpos inspiri novajn ideojn kaj novajn iniciatojn sur tiu kampo.*

[gaz kom 643]



La 102-a Universala Kongreso de Esperanto okazos inter la 22-a kaj 29-a de julio 2017.

Retejo de la Loka Kongresa Komitato en Seulo:

<http://www.2017uk.net/>

UK-retejo de UEA kun aliĝilo:

<http://www.uea.org/kongresoj/>

## Ni lavis la barbon de Zamenhof

### – kaj ankaŭ la memorŝtonon. 50-jara jubileo de la “Esperanto-Parko” en Budapeŝto

En la jaro 1966 okazis Universala Kongreso en Budapeŝto. Enkadre de ĝi estis inaŭgurita “Esperanto-Parko” ĉe la piliero de la ponto Erzsébet, kiu eĉ estis trovebla dum longa tempo per tiu nomo sur la mapoj de la urbo. La tiama urbestro mem inaŭguris la Parkon, kie estis trovebla ankaŭ Esperanto-fontano kun ĉ. 5 metra diametro, iu memorŝtono alta 70 cm, kaj statuo de Zamenhof.

La fontano jam antaŭ longe paneis, sed la Esperanto-memorŝtono kaj la statuo havas regulajn turistajn vizitantojn, kaj ankaŭ mi mem ofte haltadas ĉi tie dum ekskursoj kun esperantistaj grupoj. Dum la preterpasantaj jardekoj al la ŝtono kaj statuo algluiĝis amaso de polvo, malpuraĵo – kaj lastatempe ni jam hontis pro ilia aĉa aspekto antaŭ la eksterlandaj vizitantoj. Pro tio kun kelkaj volontuloj ni decidis, ke ni alportos kelkajn viŝ-broŝojn, purig-solvaĵojn kaj akvon, kaj ni lavos la barbon de Zamenhof – kaj kompreneble la tutan statuon kaj ankaŭ la memorŝtonon.



Sur la foto estas videble, *kia estis kaj kia iĝis la ŝtono post la puriga proceso.*

*Szilvási László*

## LibroServo vendas...



Bonvolu sendi mesaĝon al Arne Casper  
([arnecasper@yahoo.com](mailto:arnecasper@yahoo.com)) se vi deziras mendi libro(j)n:

(Al la prezo mencita mi aldonas afrankon).

- Luther Standing Bear: Mia Indiana knabeco (beletro)  
Dkr. 25,00, el la angla tradukis William R. Harmon, 82 paĝoj, 1995  
Eldonejo Bero, California.
- Adam Mickiewicz: Sinjoro Tadeo (beletro)  
Dkr. 75,00, el la pola tradukis Antoni Grabowski, 334 paĝoj,  
Varsovio 1986.
- Martemjan Rjutin: Stalino kaj la krizo de la proletara diktaturo  
(historia fakliteraturo).  
Dkr. 110,00, el la rusa tradukis Jurij Finkel, 167 c, MAS 2015 .
- L. Zamenhof: Kongresaj paroladoj (Originalaj paroladoj de la  
kongresoj 1905-1912)  
Dkr. 60,00, kompilis Alexander Korjenkov, 64 paĝoj, Kaliningrado,  
2015.
- Arthur Conan Doyle: La ĉashundo de la Baskerviloj (krimromano)  
Dkr. 130,00, el la angla tradukis William Auld, 167 paĝoj,  
Kaliningrado, 2010.



*La ne impone granda,  
sed tiom pli  
multgeneracia  
partoprenantaro de la  
pasintjara Zamenhof-  
festo en Kopenhago  
pozas por foto.*

*Jonas kaj Michael  
distras per banĝo  
kaj hobojo.*

